

esperanto sub

LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

marto - aprilo 2006 • numero 80 | volumo 14 - numero 2



ISSN 1039-9380

esperanto sub

LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO ASOCIO

Numero 80 • Vol 14.2 • Marto–Aprilo 2006

Redaktoro: *Donald Broadribb*

ELDONADO

Ĉi tiu numero estis kompostita kaj aranĝita de Donald Broadribb, per iMac. La programo uzita estas “Mel-lel”, kaj la tiparoj estas Futura, Onyx, Sand kaj Times New Roman.

ABONOJ kaj PASINTAJ NUMEROJ:

Libroservo de AEA, 143 Lawson St., Redfern NSW 2016 • Aŭstralio.

libroservo@esperanto.org.au

Por membroj ekstraj ekzempleroj de *Esperanto sub la Suda Kruc* kostas \$A3.00 + poŝtendokosto.

Pasintaj numeroj ankaŭ surrete elŝuteblas ĉe:

<http://www.esperanto.org.au/>

Esperanto sub la Suda Kruc estas aŭtomate sendata al ĉiuj membroj de AEA kaj NZEA — pliaj informoj sur la lasta paĝo de ĉi tiu eldono.

Esperanto Sub La Suda Kruc

P. O. Box 643 • York WA 6302 • Aŭstralio

☎ (08) 9641 1937 • 📠 (08) 9641 1134

esk@esperanto.org.au

Pri la opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne nepre spegulas la opiniojn aŭ de AEA, aŭ de NZEA.

© 2006, AEA & NZEA. Ĉiuj rajtoj rezervitaj.

La grafikan aspekton de la formato de *Esperanto sub la Suda Kruc* preparis Igor de Oliveira Couto.

En Ĉi Tiu Numero

Bob Felby: La 21a somerkursaro de AEA.....	3
Martin Gray: Summer School experiences.....	4
Sukcesis en ekzamenoj	4
Estraro de AEA 2006.....	4
Franciska Toubale: Vizito al Nacia Parko Bournda.....	5
Terry Manley: Taglibro pri birdidoj de la mediestuda grupo ĉe Tathra somerkursaro	6
Deziras korespondi	8
EFNSWS: Nova estraro 1006.....	8
Hubert Magis: Mi serĉas Madonobildkartojn	9
Marcel Leereveld: La bonega klimato de Melburno	9
Trevor Steele: Oficiala kunsido de la tuttriba sekurec-konsilio.....	10
De Miranda Lutz.....	14
Haveblaj ĉe la Libroservo.....	14
Fotitaj de Margaret Furness	15
Protokolo de la Ĝenerala Jarkunveno de AEA.....	18
Marcel Leereveld: Esperantologia studo	22
Kasraportoj.....	26
Odlo Bokserp: Raporto por la jaro 0239.....	30

Esperanto sub la Suda Kruc estas legebla per Interreto ĉe <http://esperanto.org.au>

La 21a Somerkursaro de A.E.A.

raportas Bob Felby

Estis, same kiel ĉiuj aliaj antaŭ ĝi, tre granda sukceso, konsiderante ke nur du, eble tri, personoj organizis ĝin, kvankam tute mankis klasĉambroj kaj speciala ejo por la Libroservo. Tio signifis, ke la komuna manĝejo devis servi kiel kunveno, ofte kun pluraj malsamaj kunvenoj okazantaj samtempe.

Kelkaj kursoj okazis en la manĝejo, kiu estis konstruaĵo tute sen fenestroj kaj pordoj, do ne estas surprize ke grandegaj muŝoj kaj aliaj insektoj enflugis kaj pikis kelkajn el la samideanoj. Kiam ni manĝis ni devis atenti pri la paperaj buŝtukoj, kiuj emis forflugi pro la fortega vento, kiu trablovnis la ejon.

La unuan vesperon ni ĉiuj komune manĝis en malnova konstruaĵo ĉe la haveno. Kvankam la konstruaĵo estas malnova oni diris al mi, ke la restoracio estas preskaŭ tute nova!

Okazis multe da fotografado kaj babilado dum ni sidis kaj atendis la manĝaĵon, kiu por vegetaranoj konsistis el nura fromaĝpasteĉo, sed feliĉe sen viando.

Iuj kursoj okazis en la loĝejoj de la kursanoj, same kiel la Libroservo.

Por la infanoj la feriejo estis tre bona, sed ne estas troigo se mi singardeme diras, ke por Somerkursaro ĝi ne taŭgas! La plej multajn tagojn la vetero estis malbonega, kaj unu tutan tagon ni havis eĉ ne elektron. Sed pri tio kompreneble ne kulpas iu ajn!

Iun tagon ni ekskursis per varmega buso por pli proksime rigardi la vidindaĵojn de Valo Bega. I.a. ni vidis du

fromaĝfabrikojn, tio fakte estis tre interesa. Ni vidis multajn vendejojn, sed aĉetis nenion. La plej bona vidindaĵo estis la "Rokkamelo" apud la maro.

Okazis teatraĵokonkurso inter la ŝtatoj aŭstraliaj. Venkis la ŝtato NSW pro sia mallonga kaj facile komprenebla teatraĵo.

Dum la festmanĝo la lastan vesperon estis disdonitaj atestiloj al tiuj, kiuj prenis parton en la kvar diversaj kursoj.

Multaj sukcese trapasis la ekzamenojn Baza kaj Meza, nur du sukcesis en la tre malfacila ekzameno Alta, nome Ivan Heldzingen, kaj nia populara Franciska Toubale. Ni ĉiuj tre fieras pri ili.

Poste ricevis sian atestilon pri la ekzameno *Klereca* iu samideano el Sudaŭstralio¹, sed li estas tro modesta por aperigi sian nomon en tiu ĉi Esperanto-gazeto!

Do, entute grandega sukceso, kaj ni el la profundo de nia koro gratulas ĉiujn, kiuj igis ĉion iri glate kaj kontentige!

[El *Tamen plu*]



Bob Felby. nia "nova" klerulo

¹ Por protekti la anonimecon de tiu sudaŭstraliano, Bob Felby, mi ne mencias lian nomon. — Odlo.

De Martin Gray

This year's Summer School was very different from last year's for me. First of all, I knew some of the people. So I was not just dropping in out of nowhere. I was not a beginner anymore, but I was also not able to slack off, as I was planning to sit the *Baza*. It was not required as part of my scholarship that I do this, but I thought that if I had a goal to work to, I would study and learn better. Also, I wanted to see what my weaknesses and strengths were — turns out the weakness is grammar, and the strength creative work. I would say this approach worked, as I was understanding a lot more Esperanto at the end of the fortnight than I was at the start.

I liked the set up of classes. Immersion teaching is great, and it makes

you use the language. But you can't pick up the finer points of grammar from it, so that is why I went to the optional afternoon classes, too.

I thought the campsite was brilliant. Peaceful, and with attractions for all ages. Pool, Lake, Tennis, hiking. Even TVs and DVDs for when our brains were full!

I look forward to next year's Summer School, the dates are better for me and I have never been to Hobart. I hope the organisers remember to keep the kids in mind — this year was great for that.

I do not think I will sit the *Meza* next year. I want to make sure I know my *Baza*-level stuff fully first. But in Sydney, in 2008, who knows? □

SUKCESIS EN EKZAMENOJ

Baza:

Martin Gray (NSW)
Barry Healy (WA)
Christine Hollis (NSW)
Dianne Mitchell (NSW)
Annolies Truman (WA)

Elementa

Heather Heldzingen (Vic.)

Meza

Dominic Else (NSW)
Hugh Malcolm (ACT)

Klereco

Robert Felby (SA)

Estraro de AEA 2006

Elektoj dum la Jarkunveno de AEA rezultigis la ĉi-sekvan estraron:

Prezidanto: Igor Couto

Vicprezidantoj: Marcel Leereveld kaj Sandor Horvath

Sekretario: Miranda Lutz

Vicsekretario: Ivan Heldzingen

Kasisto: Steve Pitney

Vickasisto: Heather Heldzingen


Vizito al Nacia Parko Bournda de Franciska Toubale

Mi preferas prisilenti la negativajn aspektojn de la ĵus okazinta somerkursaro. Ili ja estis antaŭvideblaj kaj kaŭzigitaj, laŭ mia modesta opinio, de konflikto rilate la celon de tiu aranĝo. La organizanto, kiu unue prenis tiun taskon, deziris provizi al la familioj lokon kie la infanoj povos sekure kaj libere vagi kaj havi amuzon. Fakte Kiannynferiejo estus tre bona elekto por aranĝo simila al la Renkontiĝo de Esperanto-Familioj, kiu okazas ĉiun jaron en Eŭropo. Sed la familioj en nia somerkursaro reprezentas nur unu sesonon de la tuta ĉeestantaro, kiu devis akcepti malfavorajn kondiĉojn por studi. Mi devas aldoni ke la vetero, kiun kompreneble la organizantoj ne povis regi, ne helpis. La kompatindaj lernantoj de la tria nivelo, kiuj sidis en kvazaŭverando ne nur por la kurso, sed ankaŭ por manĝi, sekvi la forumojn kaj prelegojn, devis suferi dum la tuta tago trablovon tiom fortan ke necesis ligi la tabulon al la fostoĵo por ke ĝi ne estu forblovita.

Tamen mi tre ŝatis la viziton al la nacia parko Bournda, pli precize Plaĝo Hobart, kie akceptis nin aborigeno, Gary. Li provis komprenigi al ni kiel liaj praaĵoj vivis sur tiu teritorio. Antaŭ nia alveno li metis sur tablon la modernajn aĵojn konatajn de ni ĉiuj kaj apude elementojn trovitajn en la naturo, kiujn uzis la aborigenoj samcele. Se iliaj manoj fariĝis grasplenaj post manĝo, frotado de citrona melaleŭko inter la polmoj purigis ĉion, same kiel niaj paperaj tukoj. Frotado de boronio mildigis la jukon de skabio. Frotado de filiko sur la haŭto preventis la pikon de moskitoj Per trinkado de la maceraĵo

de boligigitaj eŭkaliptofolioj eblis kuraci malvarmumon aŭ gripon. Ankaŭ kapdoloro estis kuracita per eŭkalipto. La tiama “Panadol”¹, kiu mildigis la doloron de kontuzo aŭ artrito estis melaleŭko. La gumo de speco de akacio eĉ provizis bombonojn. La muelitaj semoj de *Lomandra longifolia* miksitaj kun akvo estis la ĉiutaga pano. Same kiel ni neniam piedmigradas sen akvobotelo, aborigeno ne iris sen floro de banksio, kies nektaro sensoifigis lin.

La arbaro ne nur provizis manĝaĵojn kaj kuracilojn, sed ankaŭ ilojn. La velureca burĝono de banksio utilis kiel delikata peniko por la artaĵoj. La koloroj flava, ruĝa kaj blanka estis interŝanĝataj inter la diversaj triboj. Malmola ligno estis uzata por konstrui *nulla nulla* per kiu oni aŭ fosis la grundon aŭ uzis kiel levstangon. La gluo por teni la akraĵon de la lanco estis farita el la suko de eŭkaliptarbo miksitaj kun la sango de kanguruo.



nulla nulla (Batbastono)

Gary rakontis pri la vivo de siaj familianoj, aparte pri sia avo kiun li admiras pro lia fizika forto kaj longa vivdaŭro — li forpasis en la jaro 1975 je

¹. marko de paracetemolo, sendolorigilo.

la aĝo de 106 jaroj.

La totemo de la loka tribo estas nigra anaso, ĉar de Gulaga, (Monto Dromedory por la blankuloj), eblas vidi en la suba lago insulon je la formo de nigra anaso.

Ni iom promenis en la arbaro longe de la lago ĝis ni atingis amason da konkoj, pruvo ke la aborigenoj trovis tie favoran vivlokon. Malgraŭ tio, ili estis nomadoj. Laŭ la kutimo, kiam ili alvenis, ili rigardis la konkajn por scii per kio la antaŭuloj sin vivtenis kaj elektis alian moluskon, por eviti la malaperigon de unu el ili. Tiu konduto estas tre fora de la nuna avideco kun kiu la mediaj vivrimedoj estas ekspluatataj.

Gary konfesis ke li ne tuj komprenis la gravecon de la scioj de liaj

praavoj. Kvankam nun li informas la vizitantojn de la parko por ke tiuj scioj ne tute perdiĝu, li mem vivas laŭ la pli facila maniero same kiel ni, tio estas butikumi anstataŭ rekte uzi la riĉecojn de la arbaro. Ĉu niaj posteuloj bedaŭros ke ni ne transdonis al ili la malkovrojn de la pasinteco? □



.....

TAGLIBRO PRI BIRDIDOJ DE LA MEDIOSTUDA GRUPO ĈE TATHRA SOMERKURSARO de Terry Manley

Lundon 16-01-06

Mi vagis en arbaro apud Kianinny laŭ ĉirkaŭvojo indikata per ŝildo “Pluv-arbara Promeno”. Tiu pado sekvas valeton de defluejo natura. La ĉirkaŭanta “malseka” eŭkaliptejo havas grandajn arbojn, sed en strio de larĝeco proksimume dekmetra, kreskas plantoj kaj arboj nealtaj de pluvarbaraj specoj. La valo estis dekliveta kun fojaj faletoj de metro tie kaj tie ĉi. Ĉe la plej alta loko kie la vojeto komencis reveniri mi haltis dum tempo por ensorbi la sonojn kaj pejzaĝon de tiu bela loko. Aperis birdo malgranda ne tre for. Mi hezitis senmove por kapti rigardon kaj ident-

igi ĝin. Jes “Rufa Ventumilvostulo” (*Rhipidura rufifrons*) kvazaŭ ĉirkaŭdancis min je distanco de kelkmetroj. Sed kio? Ĝi flugis al branĉeto tuj antaŭ mi kaj tre proksima. Nur du-tri metrojn for. Sur tiu branĉeto ĝi prizorgas idojn. Mirindajn! Kaŝitajn en nesto malpli ol metron super la mezvojo de la iama akvofluo. Iu gepatro manĝigis la idojn kaj forflugis, sed ankoraŭ ne tre for. Kun pepfajfoj ĝi flugis ĉirkaŭen, ĉu por gvati min? Fortimigi min? Aŭ por serĉi plian manĝaĵon?

Mardon 17-01-06 14.00

Pluvetis de tempo al tempo. Kuniris



Fotis Yositaka Kuroyanagi (Saliko)

kun grupo de ses mediestudentoj por rigardi birdojn kaj montri al ili la neston. Ni dividiĝis je la komenco de la vojeto en du triopojn. La unua venis al la nestloko kaj staris en simila loko kiel mi antaŭe — la nesto estas nur unu metron flanke de la vojeto. Same okazis malgraŭ la nombro de rigardantoj. Du rufaj ventumilvostuloj ĉirkaŭflugis kaj venis de tempo al tempo por manĝigi la idojn. Saliko, japana grupano, malrapide alproksimiĝis kaj fotis la neston. La alia triopo alproksimiĝis kaj la unua foriris por ke oni ne tro ĝenu la manĝigantojn je ilia tasko. Dum la du rufaj ventumilvostuloj saltis de branĉo al branĉo ili svingis kaj sternis la vostplumojn montrante la belajn rufkolorojn. Estis mallume en la valetoj kaj malfacile kapti foton en tiu ombrolumo.

Ĵaŭdon 19-01-06 14.00

Iris same kun grupeto por rigardi kaj desegni plantojn iomete for de la loko de la nesto. Same oni rimarkis la ventumilvostulojn ĉirkaŭflugantajn. Mi kaptis ekrigardon per binokulo al unu kun muŝego en la buŝo. La muŝego estis 1-2 centimetrojn longa kaj de tiu pikema speco el familio *Gasterophilidae*. La ventumilvostuloj parencas al la grupo “muŝkaptuloj” en la bird-

familioj.

Sabaton 21-01-06

Kuniris kun edzino Helen, entuziasma naturamanto, por vidi kio okazas. La gepatroj ankoraŭ manĝigas la idojn. Ni sidis iom for kaj per binokuloj observis la iradon kaj venadon de la birdoj por kapti muŝojn kaj nutri la rapide kreskantajn idojn. Helen rimarkis gepatran birdon kun tia muŝego en la buŝo puŝante ĝin en buŝon de gefilo. Per tia manĝo ili certe kreskadas rapide. Nun post nur 5 tagoj la nesteto preskaŭ ne povas enteni ilin. Unu el la idoj elstreĉis la flugilojn kaj evidentiĝis, ke ili ankoraŭ ne estas flugipovaj.

Dimanĉon 22-01-06

La idoj estas for el la nesto sed kie? Ili certe ne povos regajni tiun neston sen flugo. Ĝi estas sur finaĵo de delikata maldika branĉeto je metro super la grundo. Mi ne restis longe sed la gepatroj ankoraŭfoje ĉirkaŭflugadas kvazaŭ protektante ion. Ili foje forflugis al pli alta arbo kaj bataletis kun pli grandaj birdoj. Ĉu laŭbirdoj satenaj (*Ptilinorhynchus violaceus*)? La ventumilvostuloj estas same kiel la kuzaj “Vilĉjo ventumilvostulo aŭ svingvostulo” (*Rhapidura leucophrys*). Iuj el tiu speco iam atakis min, verŝajne kiam mi estis tro proksima al ties nesto kaj mi ofte rimarkas ilin ataki pli grandajn birdojn kiel gimnorenajojn (*Gymnorhina tibicen*). Nur la lertaj flugmanovroj savas ilin de la bekegoj de tiuj predbirdoj.

Lundon 23-01-06

Iris kun gesinjoroj Bishop al la nestloko. La gepatraj birdoj ankoraŭ deĵoras en la sama areo. Ni sidis silente dum iom da tempo kaj rigardis al la

birdetoj. Alan rimarkis, ke en loko kontraŭ li, unu el la paro deteriĝis. Li rimarketis alian birdeton sub filikoj. Sed la rigardo estis eka. Verŝajne unu el la birdidoj sinkaŝas tie kaj la patra birdo iris por nutri ĝin. Ankoraŭ la vokoj de tiuj pli grandaj birdoj en la apudaj grandaj arboj.



*Gepatra birdo manĝigas idojn.
Rimarku la "voston" de la nesto*

Sabaton 28-01-06 09.00

Preskaŭ la tempo por foriri de Kianiny. Inter la taskoj farendaj, enpakado en la aŭton, netigado kaj purigado de la loĝloko. Mi iris kun Helen kaj Atilio por rigardi la birdojn. Ankoraŭ en tiu loko la ventumilvostuloj ĉirkaŭflugadas. Nun ili prizorgas lokon iom for surgrunde. Ĉu ie tie estas la idoj? Ĉu ili postvivas? Kia komenco! La nesto mem estis en nesekurega loko.

En la arbaro vagas granda lacerto, falanĝeroj, antikinoj, ĉu katoj? Kaj la nesto estis tiel proksima al la grundo kaj tiel malgranda, ke ĝi ne povis enteni la birdidojn ĝis ili estos flugipovaj! Sed ĉu la plej danĝera minaco por la birdidoj estas la specoj de predbirdoj? Antaŭ semajno kaj pli mi ne rimarkis la vokojn de tiuj laŭbobirdoj (*Ptilinorhynchus violaceus*) kaj nun mi aŭdas tiujn "pigajn streperojn" (*Strepera graculina*) parenco de gimnorenno. Mi memoras, avinjo portis kanariojn al la domo de panjo kiam ŝi venis por loĝi kun ni. Post ne multe da semajnoj kiam oni pendigis la kaĝon ekstere, venis streperoj kiuj sidis sur la kaĝo kaj ĝismorte timigis la birdetojn, poste eltiris ilin el inter la stangetoj de la kaĝo. Terura birdo! Ĉu ili minacas la birdetojn ĉi tie? Do naturo prizorgas ilin ĉiujn. Mi devas foriri kaj helpi Helenjon paki. Sed kio surgrunde tien? Ho, mirakle, lirovostulo ina. Dum la semajno mi aŭdis de tempo al tempo kaj provis ŝtelrigardi sed ne sukcesis. □



• deziras korespondi

Saluton, karaj samideanoj.

Ni estas instruistoj de esperanta korespond-lernejo de Tangshan-urbo Ĉinio. En nia lernejo multaj esperantistoj volas korespondi kun esperantistoj de via lando. Ĉu vi povas publikigi nian adreson en via gazeto? nia adreso: EKL, P.O.Box 3, Tangshan hebei 063000, Ĉinio.

Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo

Estraro 2006

Prezidanto: Igor de Oliveira Couto

Vicprezidanto: Volo Gueltling

Kasisto: Tim Wade-Ferrell

Sekretario: Margaret Chaldecott

Estraranoj:

B. Cleminson

G. Colman

A. Gaskell

Mi serĉas Madono-bildkartojn



Hubert Magis

Dum la komenco de nia geedzeco — antaŭ kvardek jaroj — ni perdis du infanojn. Estis drameca periodo, certe por mia edzino kaj tiutempe mi senhalte preĝis al la Kara Dipatrino por animtrankvilo. La ŝanĝo venis por ni kiam ni adoptis dek jarojn poste naŭtagan knabineon kaj tiamaniere ni fine tamen feliĉiĝis, ĉar nia filineto fariĝis medicina sekretario kaj elkreskis ĝis bela kaj bona virino.

Kaŭze de ĉi tiu mirakla turno-

punkto mi poste komencis kolekti vidkartojn el romkatolikaj kaj orientkatolikaj landoj rilate al la Madono (= la Kara Dipatrino + la Dia Infaneto). Sed domaĝe, estas malfacilege por mi akiri eksterlandajn vidkartojn. Sen helpo tio ĉi eĉ ne estas ebla, kaj pro tio mi nun simple demandas al vi ĉu ne estas eble publikigi la ĉi suban anonceton en via organo *Esperanto sub la Suda Kruco*:

MADONOJ

Mi estas pensrajta viro kaj kolektas romkatolikajn kaj orientortodoksajn vidkartojn rilate al la Kara Dipatrino (= Mario + la Infaneto).

— Kiu estas preta helpi min? Skribu al:

Hubert Magis
Zeelputen, 4
2200 Herentals
Belgio

□

La Bonega Klimato de Melburno! de Marcel Leereveld

Bill Sinclair loĝas en norda antaŭurbo de Melburno kaj li estas sendube la plej maljuna, aŭ ĉu mi diru, la malplej juna, esperantisto en Aŭstralio. Ĉi tiun jaron [=2005] li centjariĝis, kaj kelkaj esperantistoj, lin dum la lasta duonjarcento konantaj, ĉeestis lian festeton. Dum tiu li kapablis plu paroli esperante, sed ne bone aŭdis nin pro malforta aŭdkapablo (eble la bonega melburna klimato ne taŭgas por niaj oreloj).

Bill estis dum sia tuta laborvivo

fervojisto, kaj membro de Internacia Fervojista Esperanto-Asocio. Li multe helpis nin aŭstralieciĝi tuj post nia emigro en 1952.

Li ankaŭ korpe estis tre energia: kiam 75-jaraĝa li grimpis kun ni dum horoj al indonezia vulkano, piedirante sur la dudekmetre dika tavolo da cindroj kaj ŝtonoj ĵus antaŭe kovrintaj kaj kaŝantaj vilaĝojn, ĝis ni proksimis sufiĉe kaj danĝere por rigardi la ardantajn ŝtonegojn kaj cindron ĉielen ŝtat-ajn de la “kolera” vulkano. □

Oficiala kunsido de la Tuttriba Sekurec-Konsilio protokolita de Trevor Steele

PERSONARO:

ZONZI: ĉefkonsilistino pri ĉio

PUPINO: patrino de la tribestro

RUMOKAMPO: ĉefa defendanto de la triba teritorio

A. R. BUSTO: la tribestro

ALEKSANDRO: nova ĉefo de la tribdefenda spiona servo

Sidas ĉetable deskstre Rumokampo kaj Zonzi maldekstre. Pupino trikas iom fone, sed daŭre partoprenas en la “diskutoj”.

RUMOKAMPO: Kie li estas? [*li kaptas kaj malrapide pistas muŝon*]

(Busto sur sia ĉevaleto aperas ĉe la pordo. Zonzi kaj Rumokampo ekstaras)

ZONZI: Nia tribestro A. R. Busto!

(Eniras Busto, vakere vestita, galopante sur ligna ĉevalo. Li galopas tien kaj reen, deĉevaliĝas, lasas la ĉevalon angule, iom pafas per imagaj pistoloj, kaj iras eksidi inter Rumokampo kaj Zonzi. La aliaj volas eksidi, sed Busto ĝuas la ludon prokrasti sian eksidon, eĉ foje ŝajnigante eksidi, kaj Rumokampo kaj Zonzi devas observi la regulon, ke ili rajtas sidi nur kiam la ĉefo sidas)

BUSTO: [*stulte*] Kiu vi estas?

RUMOKAMPO: [*pacience*] Siro, mi estas Rumokampo, ĉefa defendanto de la triba teritorio.

BUSTO: Ej? Jes, tre bone, tre bone. Kaj vi, kiu vi estas?

ZONZI: Siro, mi estas Zonzi, via ĉefkonsilisto pri ĉio.

BUSTO: Ĉu vere? Tre bone, tre bone. Kaj vi?

PUPINO: Filo, ne estu stulta! Mi estas via patrino!

BUSTO: Aĥ jes, Panjo Pupino! Panjo, kion faras Paĉjo?

PUPINO: Li paŭtas. Li ne ŝatas vian politikon.

BUSTO: [*marŝas tien kaj reen, diras kun voĉo de duonploranta knabo – kaj dume la aliaj krom Pupino staras*] Panjo, diru al Paĉjo, ke mi estas nun la tribestro, sed li rajtas sidi apud mi ĉe la manĝotablo, se li promesas ne diri aĉaj-ojn pri mia politiko.

PUPINO: (*daŭre trikas, pli-malpli ignoras Buston*) Eble.

(*Busto ekstaras, iom pafas, ree surĉevaliĝas kaj galopas tien kaj reen. La aliaj devas dume stari. Rumokampo kaptas kaj pistas muŝon. Zonzi admire rigardas la galopanton*)

BUSTO: Kiu mi estas?

ZONZI: Vi estas brila, ĉefo!

RUMOKAMPO: Vi estas nia tribestro.

BUSTO: Jes, mi estas brila kaj mi estas via tribestro. Ne forgesu tion!

(*Li eksidas, ree ludante la ŝajnan eksidon, kaj la aliaj devas sekvi lian ekzemplon*)

BUSTO: Kio estas tio?

ZONZI: Tio estas la agendo de nia kunsido, siro.

BUSTO: De kiu kunsido?

RUMOKAMPO: La oficiala kunsido de la tuttriba sekurec-konsilio.

BUSTO: Ĉu vere? Jes, tre bone, tre bone. Kaj kio estas tio? (*Li pene laŭtlegas*) Rumokampo parolas pri Rakio. Do parolu, Rumokampo.

RUMOKAMPO: Jes, siro. Antaŭ tri jaroj ni invadis Rakion.

BUSTO: [*provas per fingre kalkuli ĝis tri*] Kial ni invadis Rakion?

RUMOKAMPO: Ĉar estas multe da veneno sub la tero de Rakio, kaj ni bezonas venenon por niaj sagoj, siro. Ni havas pli da sagoj ol ĉiuj aliaj triboj kune, sed ni ne havas sufiĉe da veneno.

BUSTO: (saĝe kapjesas) Kompreneble, klare, jes, ni bezonas venenon. Hej, Rumokampo, ĉu ni prenis la venenon?

RUMOKAMPO: Nu, iom. Sed siro, en Rakio estas tri klanoj. [*Busto refoje provas per fingre kalkuli ĝis tri*]. La krudoj malamas nin, la ŝijastoj pli malamas nin, kaj la sinuoj plej malamas nin. Ili ofte mortigas niajn soldatojn.

BUSTO: Ĉu vere? Ili estas fiuloj! (*tre indigne*)

RUMOKAMPO: Jes, sed nun ankaŭ niaj tribanoj ne volas, ke niaj soldatoj restu en Rakio.

BUSTO: Kaj kion vi diras, Zonzi?

12 | *esperanto sub la suda kruco*

ZONZI: Vi estas brila, ĉefo!

BUSTO: Aŭskultu tion, Rumokampo! Ŝi estas mia plej bona konsilistino pri ĉio.

ZONZI: Kaj ni ne torturas!

BUSTO: (*pene legas sur la agendo*) Rumokampo parolas pri Gŭantamio. Kio estas Gŭantamio?

RUMOKAMPO: Gŭantamio estas bela tropika loko, kie ni tenas trafikistojn el Rakio.

ZONZI: Kaj ni ne torturas!

BUSTO: Kaj kion ni faras al tiuj turistoj sur Gŭantamamio?

RUMOKAMPO: Ni bruligas iliajn piedojn kaj eltiras iliajn dentojn...

ZONZI: Kaj ni ne torturas!

RUMOKAMPO: Tio ne estas torturo!

BUSTO: Kial ni ne torturas ilin?

RUMOKAMPO: Ni volas ricevi informojn pri aliaj trafikistoj en Rakio.

BUSTO: Tre bone, tre bone. Hej, Rumokampo, ĉu ni ricevas informojn?

RUMOKAMPO: (*kaptas muŝon kaj pistas ĝin*) Ne, sed estas tre amuze!

BUSTO: Tio estas bona raporto, Rumokampo, tre bona raporto. Ĉu estas problemoj pri Rakio?

RUMOKAMPO: Estas nur unu problemo, siro. Pro Rakio nia klano perdos la venontan balotadon.

BUSTO: (*ekstaras agitate, refoje surĉevaliĝas kaj galopas, haltas*) Panjo Pupino, ĉu vi aŭdis tion? Ni perdos ĉe la venonta balotado! [*preskaŭ plorante*]

PUPINO: Nenio nova. Via patro faris same.

BUSTO: (*galopas tien kaj reen*) Kiu mi estas?

ZONZI: Vi estas brila, ĉefo!

RUMOKAMPO: Vi estas nia tribestro.

BUSTO: Jes, kaj brila tribestro ne perdas balotadon. (*Li galopas tien kaj reen, subite haltas*) Ha, mi havas ideon! Mi estis tre populara, kiam ni invadis Rakion. Do bone -- ni invadu Ranion! Ankaŭ tie estas amaso da veneno! (*Li galopas tien kaj reen*)

ZONZI: Vi estas brila, ĉefo!

RUMOKAMPO: Povus esti problemoj...

BUSTO: Ne estu defetisto, Rumokampo! Jes, ni invadu Ranion! Nun mi memoras, ke mi petis Aleksandron skribi raporton pri la temo. Momenton! (*Li forgalopas de la scenejo*)

PUPINO: Lia patro ne ŝatos tion.

RUMOKAMPO: (*ĵaluze*) Kiu estas tiu Aleksandro?

(*Eniras Aleksandro antaŭ la galopanta Busto*)

BUSTO: Jen Aleksandro, la nova ĉefo de la tribodefenda spiona servo.

(*Aleksandro manpremas la aliajn, volas eksidi maldekstre de Zonzi. Ree ĉiuj devas kunfari la nun-ni-eksidos-nun-ni-ekstaras-nun-ni-eksidas ludon de Busto*)

BUSTO: Do Aleksandro, legu vian raporton.

ALEKSANDRO: Jes, siro. (*Li laŭtlegas*) Se ni invados Ranion, la ŝijastoj de Rakio atakos nin. La sinuoj de Rakio jam atakas nin. Ni perdos Rakion. Sed pli malbone. La granda tribo de Ĉingio nun ricevas sian venenon de Ranio. Se ni invados Ranion, la ĉingoj ne plu liveros al ni brasikojn. Sen la brasikoj de Ĉingio nia ekonomio kolapsos...

BUSTO: Hej, Aleksandro, mi ne ŝatas tiun raporton!

ALEKSANDRO: Siro, ĝi estas bazita sur informoj de mil spionoj en multaj teritorioj.

BUSTO: Do ili estas stultaj, malbonaj spionoj! Arestu ilin kaj sendu ilin al Gŭat... Gŭat...

RUMOKAMPO: Gŭatnamio, siro.

BUSTO: Jes, Gŭatmamio – sendu ilin tien!

ALEKSANDRO: Jes, siro.

ZONZI: Vi estas brila, ĉefo, kaj ni ne torturas!

BUSTO: Kaj formanĝu tiun raporton, Aleksandro, aŭ mi tuj maldungos vin.

(*Aleksandro manĝas la raporton*)

BUSTO: (*per vakera kriego*) Ni invadu Ranion!

ZONZI: Vi estas brila, ĉefo! Kaj ni ne torturas!

RUMOKAMPO: Estos problemoj, sed estos diable amuze!

ALEKSANDRO: Jes, ni invadu ? Kial ne?

(Busto forgalopas de la scenejo kun la vakera kriego "Jahu!". Zonzi, Rumokampo, kaj Aleksandro postgalopas lin)

PUPINO: *(daŭre trikas)* Lia paĉjo multe paŭtos.

FINO



De Miranda Lutz:

Ĉar nun/ĉi jare estas tempo por ŝangi nian statuton, ni petas la membrojn legi kaj komenti kaj sugesti ŝanĝojn. Nia statuto estas havebla ĉe nia retejo:

<http://www.esperanto.org.au/aea/esperanto/esperanto/dokumentoj.html>. Aŭ oni povas peti min kaj mi sendos ekzempleron sur papero. Ĝi ankaŭ aperos en la adresaro.

Mi kiel sekretario petas ke se iu havas ŝanĝitan detalojn, ke tiu sendu ilin al mi rete ĉe sekretario@esperanto.org.au aŭ sur papero ĉe PO Box 339, Pascoe Vale Sth VIC 3044. Mi ankaŭ estas kontaktebla ĉe mia poŝtelefono 0438 557 653 se necesas.

La estraro kolektas komentojn pri la lasta somerkursaro en Tathra. Se iu ne respondis la demandaron tie, oni povas fari ĝin nun, ĝi estas havebla ĉe:

<http://wwwn.esperanto.org.au/aea/esperanto/esperanto/dokumentoj.html>. Ni ankaŭ volas aŭdi de la personoj kiu ne venis sed volis veni, kaj iliaj kialoj kaj komentoj. Marcel Leereveld prizorgas la somerkursajn aferojn en nia estraro do ili povas sendi komentojn al li (li ankoraŭ ne uzas komputilon, do tra mi aŭ alia estrarano estus en ordo).

Ni volas ke homoj rigardu kaj uzu la kalendaron ĉe:

<http://kalendaro.esperanto.org.au/calendar.php> por ke ili sciu kio okazas en aŭstralia-esperantujo dum la jaro.

Kelkaj federacioj jam anoncis siajn estrarajn reprezentantojn, do se la aliaj volas ili povas kontakti min por informo. □



Haveblaj ĉe la Libroservo

Paĉjo, kio estas rasismo? \$10.20

Tahar Ben Jelloun estas tre sukcesa maroka verkisto. Kiam lia filino estis 10jara ŝi multe demandis pri rasismo. Tial la verkisto ekhavis la ideon verki tiun libreton. Ĝi celas klarigi rasismon al infanoj kiuj ankoraŭ ne havas antaŭjuĝojn kaj volas kompreni.

Vorto mozaiko \$18.50

Ludo simileta al "Scrabble". Estas 101 literkartetoj kun ĉiuj esperanto-literoj, inkluzive tiujn kun ĉapeloj kompreneble. Por oftaj literoj estas pli da kartoj ol por aliaj, ekzemple estas 10 kartoj kun la litero "E", sed nur 2 kartoj kun la litero "Z". La literkartoj estas bonkvalitaj kaj ne rapide difektiĝos. □

Fotitaj de Margaret Furness



Ruĝbekaj mevoj kun idoj



Kormoranaro de Insulo Stewart



Flavokula Pingveno



Norda Ruĝa Albatroso



Fuko ĉe Dunedin Head



Fungoj ŝajnigantaj sin mortaj astakoj

Ke ni akceptu la prezidantan raporton: Proponinto: Heather Heldzingen
Subteninto: June Perkins akceptita

Sekretaria raporto estis disdonita sur papero.

Ke ni akceptu la sekretarian raporton: Proponinto: Hazel Green
Subteninto: June Perkins akceptita

Kasista raporto estis disdonita sur papero.

La kasisto konsentis aperigi la raporton en la retejo.
La kunveno konfirmis ke AEA estas ne-por-profita organizo.
Klarigo ke la kasista raporto estas pei julio ĝis junio ĉiujare.
Detaloj pri la fondusoj aperos en ESK post la kunveno.
Korektoj: paĝo 1 2004 estu 2005 kaj 2003 estu 2004
paĝo 5 ne estas oficiala

Ke ni akceptu la kasistan raporton kun Proponinto: Marcel Leereveld
la supraj korektoj Subteninto: Sandor Horvath akceptita

Aliaj raportoj:

UEA ĉefdelegito – Penny Vos — Alan Grant pretas esti delegito
Komitatano-A – Sandor Horvath
Ekzamenoj – Marcel Leereveld
Korespondaj kursoj – Hazel Green
AEA interreto – Igor Couto
Edukado – Penny Vos
Radio 3ZZZ – Franciska Toubale – dankletero estu sendota al Svetislav Kanacki
La kunveno dankis al Donald Braodribb pro lia laboro pri *Esperanto Sub la Suda Kruco* – dankletero estu sendota.
Helpada grupo – Penny Vos
Skoltismo – Penny Vos
Famililoj – Penny Vos

Fermo: 22:32

24 Januaro 2006

Malfermo: 19:44

Aliaj raportoj:

Esperanto en Indonezio kaj la agadoj de S-ro Hazairin – Dianne Lukes
Montesori-Lernejo Treetops – raportoj estis pruntedonitaj al la ĉeestantoj – Annolies Truman
Vojaĝado-teamo – Penny Vos
Komunikado-teamo – Igor Couto
Sudaŭstralia raporto – Sandor Horvath
Libroservo – Nicole Else
Kvinslanda raporto – June Perkins
Historio de Esperanto en Australio - Terry Manly
Esperanto-Biblioteko en Kanbero – Terry Manly

Elektoj:

La estraro demisiis kaj Sandor Horvath estris la procedon ĝis la nova prezidanto. Kam Lee kaj Henry Broadbent estris la voĉdonadon (disdonis kaj kalkulis paperajn voĉdonojn).

Prezidanto

Marcel Leereveld	Proponinto: Ivan Heldzingen Subteninto: Heather Heldzingen	
Igor Couto	Proponinto: Trevor Steele Subteninto: Dianne Lukes	sukcesis

Sandor Horvath demandis la membraron, ĉu publikigi la nombrojn de la voĉdonado, kaj la plejmulto de la

20 | esperanto sub la suda kruco

ĉeestantoj kontraŭis la publikigon.

Vicprezidanto (unua elekto)

Marcel Leereveld Proponinto: Franciska Toubale
Subteninto: Tim Wade-Farrell sukcesis

Sandor Horvath Proponinto: Terry Manly
Subteninto: June Perkins

Penny Vos Proponinto: Miranda Lutz
Subteninto: Martin Gray

Vicprezidanto (dua elekto)

Sandor Horvath Proponinto: Ivan Heldzingen
Subteninto: Franciska Toubale sukcesis

Penny Vos Proponinto: June Perkins
Subteninto: Sandra Connors

Sekretario

Ivan Heldzingen Proponinto: Franciska Toubale
Subteninto: Bernie Heinze

Miranda Lutz Proponinto: Anthony Gaskell
Subteninto: Penny Vos sukcesis

Vicsekretario

Penny Vos Proponinto: Dianne Lukes
Subteninto: Miranda Lutz

Ivan Heldzingen Proponinto: Paul Gorney
Subteninto: Franciska Toubale sukcesis

Kasisto

Stephen Pitney Proponinto: Igor Couto
Subteninto: Miranda Lutz akceptita

Vickasisto

Heather Heldzingen Proponinto: Franciska Toubale
Subteninto: Trevor Steele akceptita

La nova prezidanto dankis al la pasinta estraro kaj diris belan feliĉan dormon kaj sonĝojn al la ĉeestantoj.

Fermo: 22:45

25 Januaro 2006

Malfermo: 20:02

La prezidanto dankis al la pasinta estraro kaj la organizantoj de la nuntempa somerkursaro.

La prezidanto ofertis honoran membrecon al Marcel Leereveld sed li ne akceptis.

La sekretario informis ke la nomo de unu reprezentanto de ĉiu ŝtata federacio estu akceptota kiel estrarano post la AEA ĝenerala kunveno.

La kasisto informis ke la nuna kontrolisto de kontoj, Addisons, plu oficos por 2006.

Kotizoj

Ke la kotizoj estu \$40 por plen-jara membreco Proponinto: Marcel Leereveld akceptita
kaj \$25 por specialpreza membreco Subteninto: Franciska Toubale

Korporaciigo/statuto/strukturo (sekretario informis)

ke nia transiro el ACT al Viktorio ankoraŭ progresas
 ke la estraro decidis dungi profesion helpon por kontroli nian statuton, certigi pri asekuraj aferoj/
 respondecaj aferoj kaj helpi pri la transiro
 ke ŝanĝoj al nia statuto okazos kaj ni voĉdonos dum la jaro, la sekretario invitis sugestojn pri la ŝanĝoj kaj
 informis ke la proponoj aperos en ESK
 la kasisto informis ke la asocio mem taksas nin kiel “ne-por-profitita” organizo

Indonezio

Ke AEA ne daŭrigu rektan financon subtenon al S-ro	Proponinto: Franciska Toubale	akceptita
Hazairin en Indonezio, sed transdonu la taskon (kaj	Subteninto: Bernie Heinze	
la jam faritan laboron pri la vortaro) al la Oceania komisiono		

Financa buĝeto por 2006**proponinto: kasisto, Steve Pitney**

\$5,000 maksimume por leĝa konsilo	Subteninto: Sandra Connors	akceptita
\$20,000 maksimume por stipendioj kaj disvastigado	Subteninto: Hazel Green	akceptita
\$3,000 maksimume por eksterlandana instruisto al la venonta somerkursaro	Subteninto: Anthony Gaskell	akceptita
\$2,000 maksimume por informado	Subteninto: Betty Broadbent	akceptita

La estraro decidis nomumi komisiiton por analizi, kunlabori kaj raportoj al la estraro pri la Libroservo.

Ke AEA daŭrigu la dungadon de Nicole Else	Subteninto: Terry Manly	akceptita
ĉe la Libroservo ĝis Junio 2006 (maksimume \$5,000), kiam la komisiito raportos pri la situacio		

Somerkuraroj venontaj

La estraro respondecas pri la somerkursaroj kaj nomumis vicprezidanton Marcel Leerevel kiel prizorganton. La sekretario informis ke nova esperanta federacio estis akceptita en Tasmanio en AEA kiu invitas la venontan somerkursaron.

Ke la 2007 somerkuraro okazu en Hobarto	Proponinto: Marcel Leereveld	akceptita
	Subteninto: Kam Lee	
Ke la 2008 somerkuraro provizore okazu en Sidnejo	Proponinto: Igor Couto	akceptita
	Subteninto: Hazel Green	

Eventoj dum la jaro

La sekretario informis ke ni povas uzi la kalendaro sur la AEA retejo por sciigi pri okazoj dum la jaro.

Retejo

Okazis konfuzo pri la informo en la AEA retejo. La sitestro respondis al la demandoj.

Aliaj Aferoj/Propoj

Ke la komisiitoj por la biblioteko estu Hugh Malcolm, Terry Manly kaj Chris Hollis	Proponinto: Terry Manly	akceptita
	Subteninto: Igor Couto	

Ivan Heldzingen diris ke AEA ne havas oficialan strategian planon.

Ke Hugh Malcolm estu la nuntempa publika oficisto

Proponinto: Miranda Lutz akceptita
Subteninto: Ivan Heldzingen

Miranda Lutz pretas esti publika oficisto estontece.

Estis klarigite ke nuntempaj validaj komisiitoj rajtas uzi oficialan AEA-leterpaperon.

Jennifer Bishop parolis pri la valora laboro de la redaktoro de ESK, Donald Broadribb kaj liaj elsendantaj helpantoj Margaret kaj Peter Inglis. La kunveno dankis ilin.

La kunveno dankis Hugh Malcolm pro lia laboro pri bibliotekaj aferoj.

La dato de la venonta somerkuraro provizore estu 7-20 Januaro, 2007, kaj la venonta AEA Ĝenerala Jarkunveno provizore estu en la Zamenhofa Ĉambro en Januaro 2007.

La prezidanto dankis pro ĉeesto kaj bonvenigis daŭigi la komunikado kun la estraranoj dum la jaro.

Fermo: 22:14

.....

Esperantologia studo

LA SPECIALECO EN LA ESPERANTA VORTFORMADO

de Marcel Leereveld

Kiel tipe aglutina lingvo, Esperanto havas riĉe la tri formojn de vortformado:

1) Finajŝanĝado: *varma* → *varmajn*; inkl. alikategoriigo de vortspecoj: *labori* → *laboro*.

2) Derivado: aldono de afikso al radiko: *labori* → *laborilo*; *veni* → *reveni*.

3) Vortkunmetado: kunmeto de du aŭ pli da radikoj: *pumpo por akvo* → *akvopumpo*; (tempo) *post la mezo de tago* → *posttagmezo*.

Ĝeneralaj karaktereroj

Aglutina lingvo estas lingvo, en kiu oni formas vortojn el aliaj vortoj per la simpla kunluado, kunmetado, de du (aŭ pli da) radikoj, tiel kreante novan unuecan vorton por nova unueca nocio. En tiu procedo la partoj mem de tiaj kunluadoj ne ŝanĝiĝas kaj retenas sian individuan signifon, nun unuigitan kun aliaj signiferoj en la nova vorto.

Ni substreku, ke parolante pri kunmetado, la gramatikistoj celas la signifan kaj parolan kaj skriban unuecon de la nova vorto. Ni nomas tion sintezo (ekz. *lernejo*). Se ni parolas pri kombinado de vortoj, la vortoj restas apartaj, kaj ni povas nomi tiun esprimmanieron analiza (ekz. ejo por

lerni).

Laŭ aglutina regulo, ĉiu sintezaĵo (ekz. *tablotuko*) elvenas el analizaĵo (*tuko por la tablo*). Tio validas en Esperanto eĉ por la finaĵoj: *laboro* estas *o* (= *io*) konsistanta el *ago labori*. Same *besta* estas *eco* vidata kiel karakteraĵo de iu substantivo.

En aglutina lingvo la signifo de la sinteza formo ne simple konsistas el la adiciigo de la signifo de la partoj. Do *dormĉambro* ne signifas la dormon plus la ĉambro, nek *patrino* signifas la patron plus la inon. Se temas pri simpla adicio, kio ne ofte okazas, ni ne sintezigas, sed kombinas la originajn vortojn per streketo: *anglafranca* vortaro; la *direktoro-administranto* de la kompanio; ilia agado estas nur *ataki-retroiri*. (*Anglofranca* vortaro estus vortaro de francaj vortoj influataj de la angla lingvo). Ne, en vortformado temas pri pli ol tio: unu parto estas la ĉefelemento kaj la aliaj partoj difinas, determinas, plivastigas, tiun ĉefelementon: *laboro* estas *-o* (= *io*) difinita per la *ago labori*; *tablotuko* estas *tuko* difinita al certa celo: *la tablo*.

Ekzistas tri reguloj koncerne la vortpluformadon. La unua estas, ke la ĉefelemento ĉiam troviĝas laste en la kunmet-

aĵo (kvankam ekzistas naturaj esceptoj al tiu regulo, klarigotaj poste). Do *akvotubo* ĉiam estas *tubo*, neniam *akvo*, (*akvo* estas la difinanto, nomita “la determinanto”). (Notu ke en la analiza formo la ĉefelemento troviĝas normale en la unua loko: *tablotuko* = tuko por tabloj, do *tuko*, ne tabloj).

La dua regulo estas, ke ekzistas aldonita rilatosignifo inter la ĉefelemento kaj la vortelemento(j) antaŭ ĝi. Tiu rilato estas prepozicia: aŭ esprimita de iu (ne gravas kiu) prepozicio en la analiza formo, aŭ de simpla predikativa rilato (kiu gramatikfunkcie tre similas al prepozicia), nome “estas”, “egalas”. Do *marfiŝo* estas *fiŝo* en (aŭ de) la maro, kaj *domego* estas “domo kiu estas ega”. Tiu rilato estas la tria signifero en la nova vorto el du radikoj. (Notu ke, se necesa, la prepozicia rilato povas esprimati ankaŭ en la sinteza formo: *kastelo sur la monto* — *surmonta* kastelo).

La tria regulo estas, ke la kvara, al la kunmetaĵo aldonita, signifero estas la nocio “speciala” aldonenda al la ĉefelemento. *Lernejo* ne estas simple “ejo por lerni”, ĝi estas “speciala ejo por lerni”, speciale konstruita aŭ celata por lerni. “Tuko por tablo” povas esti iu ajn tuko hazarde uzata sur la tablo, sed “*tablotuko*” estas speciale formita kaj fabrikita por la celo kuŝi sur tablo. *Dometo* ne estas simple malgranda domo, eĉ ne eta domo, sed speciala speco de malgrandaj domoj. Ankaŭ en la etnaj lingvoj oni kutime havas specialajn vortojn por tiaj specialaĵoj (ekz. *cottage* en la angla). Pro tiu regulo ni kapablas krei nur limigitan kvanton de novaj vortoj: ni ne povas uzi “*luneto*” se ni celas “malgranda luno”, ktp. Kvankam ĝia intenseco varias ĉe la diversaj specoj de vortformado, tiu signifero de specialeco, enkorpigita en ĉiun kunmetaĵon, estas grava elemento en la vortpluformado.

Pro tiuj limigoj de determinado (ĉefelemento!) kaj de interrilato (prepozicia!) kaj de aldonenda specialeco, ni kapablas krei nur relative malgrandan kvanton de

vortoj, relative al la teoria ebleco krei milionojn da vortoj. Tio tamen ebligas al ni krei la kelkajn milojn da vortoj bezonataj pro la necesaj korespondaj nocioj.

Por ne esti mallogikaj, ni devas zorgi, ke ni ne kreas novajn vortojn por nocioj kiuj ne ekzistas, ekz. *tabli*, *mispluvi*, *malneĝi*, *neĝono*, *boĝardeno*, *sunilo*, *poŝtelo*, *tapiŝino*, *vojluno*, *pardarbo*, *maltrinki*, *transhare*, *libroŝuo*, *vortplanto*, *arbporo*, *boatsukero*, *ranstacidomo*, *lunfiŝo*, *planklako*, *oa*, *oi*, *ii*, *gesakoj*, *pentrajdo*, *idebesto*, *ŝtupero*, *lanvino*, *vinlano*, *inkmuro*, ktp. ktp. ktp. ĝis milionoj.

Aliflanke ni devas zorgi, ke niaj novaj vortoj diferencas for de la analiza uzo de la partoj de iu kunluajaĵo. Tio pleje necesas ĉe la vortkunmetado, kie ni ja kunigas du radikojn. Necesas do ĉiam konscii, ke estas klara signifodiferenco inter *ĝardenplanto* kaj “*planto en (de) la ĝardeno*”, inter *domego* kaj *granda domo*, inter *manĝilo* kaj (*hazarda*) *ilo por manĝi*, inter *naĝejo* kaj *ejo por naĝi*, inter *vagonaro* kaj *aro de vagonoj*, kaj eĉ inter *domoj* kaj *kvanto da domoj*.

1. Finaĵŝanĝado.

Ĉe ŝanĝiĝo de la finaĵoj, la specialiĝo konsistas precipe en ŝanĝiĝo de la (gramatika) aspekto de la vorto. Ĉu uzi vorton kiel substantivon, verbon, adjektivon aŭ adverbbon, dependas de la rolo kiun ĝi ludas kun la aliaj vortoj, aŭ laŭ tio, kio plej konvenas en la bildo kiun ni deziras krei en nia kaj alies mensoj. Ankaŭ la plurala *-j* kaj la akuzativa *-n* dependas precipe de la aspekto, de iliaj lokoj inter la aliaj bilderoj. Ĉi ĉio tamen estas specialeca uzo, kaj la rilato inter la radiko kaj la finaĵo estas predikativa: *ludo* estas *o* kio estas, konsistas en, *ludi*.

En ĉi tiun grupon ni povas klasi ankaŭ la komencaĵŝanĝadon (iel, tiel, kiel, ĉiel, neniel), kvankam Zamenhof decidis, eble saĝe, ke ĉiu el tiuj eblaj vortoj estas mem individua radiko.

2. Derivado.

Derivado konsistas en la kunmeto de radiko kaj afikso (krom la necesa finaĵo). Ankaŭ ĉi tie aplikiĝas la regulo pri specialeco: *klubano* ne estas simple iu kiu estas membre de klube, sed ŝi/li samtempe apartenas al speciala socia grupo aŭ klaso, tiu de la klubanoj. Sed tiu ĉi regulo pri specialeco ne ĉiam estas same certa ĉe la derivado kiel ĉe la aliaj kunmetadoj. Ankaŭ la regulo pri la rilato inter la du elementoj estas iomete malsama: temas pli pri adjektiva rilato; cetere la adjektivo funkcio samas al la prepozitivo. Tiel *gefratoj* estas *geaj fratoj*, *reveni* estas *ree veni*, kaj *dom-ego* estas *ega domo*, en analiza formo (kun nuanco de diferenco).

Bedaŭrinde, sed neeviteble, ekzistas du specoj de afikso: la t.n. afiksoj veraj kaj la t.n. afiksoidoj. Ambaŭ specoj modifas la signifon de la ĉefradiko, en ambaŭ specoj validas, kvankam malforte, la reguloj pri specialeco kaj pri prepozicia rilato; sed en la afiksoj veraj validas la kontraŭa determinado ol ĉe la afiksoidoj kaj ĉe la du aliaj klasoj de vortpluformado.

La esenca karaktero de derivado (ja per afikso kun radiko) do estas, ke la determinad-direkto estas la kontraŭa al tiu de la vortkunmetado (per radikoj nur). Ĉe la lasta, la kerno, la determinato, de la kunmetaĵo estas la lasta elemento de la nova vorto, dum ĉe la afiksoj (veraj) la kerno, la determinato, estas la unua elemento. Dum *dompordo* estas *pordo*, ne domo, la derivado *domego* estas *domo*, ne ego. Same la *artamo* estas *amo*, ne arto, sed la *malamo* estas *malo* pri io (ami), ne la amo mem. La afiksoidoj, aliflanke, sekvas la determinadregulon de la radikaj kunmetaĵoj, kvankam cetere ili kondukas kiel afiksoj.¹


Ne estas la kulpo de Zamenhof, ke ni

havas en Esperanto du specojn de afiksoj: kulpas la aglutinaj lingvoj, kiuj disvolviĝis tiel, kaj kies disvolviĝon ni ne povas renversi en Esperanto. Estus pli logika, havi du apartajn nomojn por la du specoj de derivado, sed ĉar la nombro de afiksoj veraj estas tre malgranda, oni normale kunigas ambaŭ specojn sub unu nomo: afiksoj aŭ *derivado*, ĉar ĝenerale ambaŭ *aspektas* similaj en formo kaj funkcio. La prefiksoj veraj estas: *bo*, *eks*, *ge*, *mal*, *pra*. La sufiksoj veraj estas *et*, *eg*, *aĉ*, *um*. Ĉiuj aliaj t.n. prefiksoj kaj sufiksoj estas prefiksoidoj kaj sufiksoidoj. Ĉe ĉi tiuj la determinato estas ĉiam la lasta parto (radiko ĉe la prefiksoj, afikso ĉe la sufiksoj). Ne estas esceptoj al la reguloj por la derivaĵoj.

3. Vortkunmetado.

Ĉe la kunmetado de du aŭ pli da radikoj validas kutime kaj la regulo pri la prepozicia rilato inter la elementoj, kaj la regulo pri la determinad-direkto (la lasta elemento estas la kerno, la determinato), kaj la regulo pri la specialeco de la ĉefelemento.

Ne ekzistas esceptoj al la grava regulo pri specialeco, nek al tiu pri la prepozicia rilato (laŭ kiu ĉiu kunmetaĵo, ja sinteza, elvenas el [ja analiza] prepozitivo [aŭ predikativo]). La kvar esceptoj okazas ĉe la regulo pri determinado. Ili estas sistemaj esceptoj, kaŭzigitaj de la funkcmankado de nia menso, kaj Zamenhof ne povas kulpigati pri tio. La unua estas ke oni malinkluzivigas la pronomojn kiel ĉefelementojn kaj, kutime sed ne ĉiam, ankaŭ kiel flankelementojn. La tialo estas la mallongeco de la pronomoj. Oni do ne diras pri du personoj, li sur la tero kaj ŝi en la akvo, ke ili estas *terli* (aŭ *terlio*) kaj *akvoŝi* (aŭ *akvoŝio*). La vortoj ne plu estus rekon-eblaj. Same pri aliaj pronomoj, eĉ la korelativoj. Tre malofte oni renkontas kunmetaĵon kun pronomo kiel flankelemento (neniam kiel ĉefelemento): la *tielnomato* (kontraŭ “la tiel nomata”); ankaŭ la vortoj *kioma*, *tialo*, *tiea* kaj *iele*. La numeraloj inter si havas apartan, verprefiksosimilan,

¹ *Noto de la redaktoro: kvankam ĉi tiu parto 2 ŝajnas tre kompleksa, ĝi atentigas pri gramatika afero tre grava en la esperantolog-gramatika fenomeno kiu perpleksas multajn “progresintajn” lernantojn. Ni tial forte rekomendas zorge studi ĉi tiun parton de la artikolo. —* 

regulon (*dudek* = du dekoj), kaj cetera kondukas jen kiel adjektivoj (la *durura* katedralo), jen kiel substantivoj (*duobla*).

Dua kazo estas, kiam la flankelemento estas sufikso; en tiu kazo, ree pro mallongeco kaj nerekonobleco, oni metas streketon inter la du elementoj: *il-fabrikado*, *in-necesajo*, ktp.

La tria kazo temas pri la prepozicioj, se ili estas la determinatoj. En tiu kazo oni simple renversas la vicordon: oni uzas “eksterlandaj turistoj” anstataŭ la logika “landeksteraj turistoj” (logika, ĉar la turistoj ne estas de nia lando, sed de la ekstereco ekster nia lando); same “*surmonta flago*” anstataŭ la logika “*montsura flago*”, kaj *antaŭmanĝa* trinko (kiu devus esti *manĝantaŭa*, ĉar la trinkado ne estas manĝa, sed antaŭ io, antaŭa). La tialo por ĉi tiu necesa escepto estas ree la mallongeco, ĉikaze de la prepozicioj, kaj la el tio sekvanta nekomprenebleco.

La kvara kazo estas normala en la sinteza formo, sed nenormala en la analiza formo. Ĝi koncernas la adjektivojn: dum normale ni diras “la *bluroba* virino”, kie la ĉefelemento estas “*roba*” difinata de “*blu*”, ni en la analiza formo kutime, kvankam ne devige, metas la determinaton same post la aliajn elementojn: la blua robo, dum normale ni faras la kontraŭon pri suplementoj: robo kun blankaj randoj. Pro ĝermana influo Zamenhof transplantis nelogikan vicordon al Esperanto: ni devus ĉiam en la analizaj esprimoj meti la adjektivon post la substantivon, por esti konsekvencaj aglutinecaj, dirante *la robo blua*, *la espero vana*, ktp. Estas stranga, ke Esperantistoj el etnaj lingvoj uzantaj la ĝustan vicordon aŭtomate ŝanĝas sian kutimon en Esperanto (sen neceso aŭ devo) kaj uzas la nelogikan kutimon. Sendube Zamenhof parte kulpas pri tio, sed li almenaŭ lasis nin liberaj elekti nian preferon.

La klasoj de kunmetado.

Pro naturaj kaŭzoj, iuj vortformadoj eblas kaj aliaj ne. La finaĵo *-j* kunmetatas kun

substantivoj kaj adjektivoj nur (varmaj piedoj). La finaĵo *-n* povas kunmetati kun substantivoj, adjektivoj, kaj adverboj, sed ne kun verbaj formoj (altajn domojn; hejmen).

La kategoriaj finaĵoj povas kunmetati kun iu ajn radiko aŭ afikso (sed nur se koresponda nocio ekzistas), sed ne kun alia kategoria finaĵo (**varmao*, **varmoa*, ktp).

Ciu afikso havas sian propran kunmetebilon, depende de la signifo. Ekz. eblas *manĝilo*, sed ne *harilo*, kaj *reveni* sed ne *retablo*. Krome kelkaj kunmeteblos kun substantivoj, adjektivoj, kaj verboj (ekz. *-um*), kaj aliaj nur kun du kategorioj (ekz. *-ec* nur kun adjektivoj kaj substantivoj); la ceteraj nur kun unu kategorio (ekz. *-il* nur kun verboj).

Principe ne eblas kunmeti ĉefelementan substantivon kun ĝia adjektivo, nek ĉefelementan verbon kun ĝia adverbo aŭ kun ĝia gramatika objekto. La tialo estas, ke mankas tie la ekstra nocio “speciala”, kaj do ne plu eblas distingi inter ekz. *dikfingro* por dika fingro (sen speciala nocio) kaj *dikfingro* (= speciala fingro dika). Ja estas klara diferenco inter *dika fingro*, iu ajn fingro, kaj *dikfingro*, kiu estas speciala speco de fingro. Same pri la adverboj kaj la objektoj ĉe verboj. *P.A.G.* ĝuste kaj forte rekomendas ne krei pliajn tiajn kunmetaĵojn iniciatitajn de Zamenhof, por ne ruiniĝi la vortformadprocedon en Esperanto (§ 423).

Ni konsciu tamen, ke tiaj nelegitimaj kunmetoj eblas, se la kunmeto alikategoriga aŭ deriviga. Dum ne eblas diri *ruĝ-rozo* nek *belvesti* nek *fîŝmanĝi*, ni povas uzi *ruĝroza* bedo, *belvestito*, kaj *fîŝmanĝanto*. Tio eblas, ĉar ĉe tia ŝanĝo la nova finaĵo aŭ alia ĉefelemento ricevas per tiu procedo karakteron de specialeco. Tiu specialeco ne estis en la proprokategoriaj formoj, ĉar ili estis ĝeneralsencaj.

Speciale riĉa formo de pluformado en Esperanto, ne ofta en ĝermanaj aglutinaj lingvoj, estas tiu kun adjektivoj kaj adverboj: La virino en la blua robo → la

(en)*bluroba* virino; Ili promenis en la ĉefa strato → ili promenis (en)*ĉefstrate*; Ŝi skribas per sia maldekstra mano → ŝi skribas (per) *maldekstromane*. Tiuj popularaj esprimoj ofte estas nenaturaj, ĉar mankas la specialeco: ili ja ne ĉiam reprezentas

unuecajn nociojn, kaj tial ne havas en etnaj lingvoj specialajn vortojn. Estas malfacila imagi, ke “*bluroba*” estas speciala karaktero, kontraŭe al “*maldekstromane*”, kiu nocio ŝajnas specialaĵo (komp. *maldekstromanul(in)o*, ktp.). □

Kasraportoj

Aŭstralia Esperanto Asocio Inc.
FINANCA REPORTO - ĝis 30an JUNIO 2005

Profito kaj Perdo - Detilero

Ĉefaj Punktoj - Elspezoj superis enspezojn de \$ 30,295.88

Ĉefa Enveno

1. A&P investoj kreitaj de	\$ 7,593
2. Bankprocento	\$ 13,645

Ĉefaj Elspezoj

3. Libraj eldonoj	\$ 3,384
4. Libroservo administr.	\$4,890
5. Indonezio	\$ 2,156
6. Somerkursaj stipendioj por instruistoj	\$ 5,000
7. Sostaranto	\$ 10,000
8. Oportuno	\$ 1,360
9. L&K disdono	\$ 4,123

Sumigo de Adiciaj Somerkursoj 2005

Enspezoj	\$ 30,423
Elspezoj	\$ 31,093
profito	2,300

Malpli	AEA kontribuoj por komenco	- \$ 500
	AEA kontribuoj por instruistoj	- \$ 8,000
	AEA instruistaj stipendioj	- \$ 5,000
	Sumo	- \$ 11,230

AEA disdono de profito kaj fermi konto- \$ 4,123

Sumigo de Libroservoj

	2005	2004
Enspezoj por abonoj	\$ 19,230	\$ 15,749
Elspezoj por abonoj	\$ 28,103	\$ 1,429

Komento: multaj abonoj por 2004 ne okazis...

AEA Membros

Sumo de la Financa (anoj)	2005	2004	ŝanĝo
Honora/Ĉuveniva	21	20	1
Ordinara	85	82	3
Koncesia	25	50	- 15
Familia (Asocio)	18	17	1
Organj	9	9	0
Eksterlanda	10	5	5
Sumoj	178	183	- 5

Kontrolista Detilero

Reporto de CPA firmo 'Addisons' estas eligata - (j) detilero ke la kontoj estas ĝustaj.

Ĝi ne povas plene ekraporti la kontojn de la Libroservo au la LEA ĉar ili ne estas hebrebla.

Imposto

Je 7 de marto, la Australian Tax Office konfirmas ke nia asocio estas registrata kiel "libera de imposto" ĉar ni mem traktita ke ni estas tiu esita eligita por promisi literaturo laŭ punkto 9 1 Sect. 50-45 de la ITAA1997.

Publika Oficisto: Hugh Malcolm en ACT estas elektita en 01 fu rolo denov.

Stephen Pitsoy & Jennifer Bishop (Kasisto & Volkasisto de la AEA 2005)

5:55 PM

15/12/05

Australian Esperanto Association Inc.
Profit & Loss Prev Year Comparison
 July 2004 through June 2005

	Jul '2004 - Jun 2005	Jul '2003 - Jun 2004	\$ Change
Ordinary Income/Expense			
Income			
Members Subscriptions	4,033.00	4,677.20	-644.20
Interest Received (Bank)	13,644.61	10,509.41	3,135.20
AMP Trust Revaluation	7,692.60	5,279.08	2,413.52
Corresp. Course Income	380.00	332.10	47.90
EsSK International Subs.	2,034.55	1,499.59	534.96
Donations / Bequests	0.00	52,726.73	-52,726.73
Libroservo Income	19,229.58	15,749.27	3,480.31
Summer School Income	33,422.69	800.00	32,622.69
Sundry Income (Exams, Posters..)	122.00	908.55	-786.55
Total Income	80,559.03	92,481.93	-11,922.90
Expense			
OPERATING -			
Auditor's Remuneration	1,540.00	1,540.00	0.00
Bank Charges	166.90	126.30	40.60
Computer Expenses	388.01	0.00	388.01
Corresp. Course Expenses	191.30	170.65	20.65
Donation / Gifts	100.00	0.00	100.00
Insurances	189.54	375.85	-186.31
Postage	111.80	129.50	-17.70
Printing & Stationery	64.70	135.47	-70.77
Sundry Expenses	132.60	64.95	67.65
UEA Subscription	361.18	367.28	-6.10
Uncategorised Expenses	0.00	-230.00	230.00
Total OPERATING -	3,246.03	2,680.00	566.03
PUBLISHING -			
Adesaro & Book Catalogue	0.00	1,899.48	-1,899.48
Book Publishing (K. el K, Felby)	2,383.51	0.00	2,383.51
ESK Magazine Expenses	3,363.55	2,763.71	599.84
ESK Sinking Fund	500.00	750.00	-250.00
Exams	161.60	0.00	161.60
Total PUBLISHING -	6,408.66	5,413.19	995.47
LIBROSERVO -			
Administration - Wages	4,890.00	0.00	4,890.00
Books / Magazines from UEA	28,103.47	1,428.96	26,674.51
Libroservo General Expense	529.05	569.48	-40.43
Total LIBROSERVO -	33,522.52	1,998.44	31,524.08
PROJECTS -			
Indonezio	2,156.31	0.00	2,156.31
Instruado (Svislando)	10,000.00	0.00	10,000.00
Informado	110.00	228.00	-118.00
Eksterlando (Oceania...)	1,360.20	0.00	1,360.20
Total PROJECTS -	13,626.51	228.00	13,398.51
SUMMER SCHOOLS -			
Accommodation, Hire, Printing	31,092.78	500.00	30,592.78
Teachers, Travel & Expenses	8,066.20	0.00	8,066.20
Teacher Scholarships	5,000.00	0.00	5,000.00
Distribution of Funds to LKK	4,123.14	0.00	4,123.14
Total SUMMER SCHOOLS -	48,282.12	500.00	47,782.12
DEPRECIATION -Books & Equipment	5,770.07	3,963.00	1,807.07
Total Expense	110,855.91	14,782.63	96,073.28
Net Ordinary Income	-30,296.88	77,699.30	-107,996.18
Net Income	-30,296.88	77,699.30	-107,996.18

16/12/05

Balance Sheet Prev Year Comparison As of June 30, 2005

	Jun 30, 2005	Jun 30, 2004	\$ Change
ASSETS			
Current Assets			
Current/Savings			
1. OPERATING ACCOUNT			
CBA Cheque Account 0090 3636	5,577.40	3,661.23	1,916.17
Internet Banking Account	55.04	0.00	55.04
CBS Term 501 45625 (12/12/2005)	8,872.25	8,324.62	347.63
Total 1. OPERATING ACCOUNT	14,304.69	11,985.85	2,318.84
2. CAPITAL ACCOUNT (Fonduso)			
Cheque Account 00946975	17,335.49	7,874.07	9,461.42
AMP Blue Chip	19,350.95	15,355.88	3,995.08
AMP Future Direction - Shares	9,972.01	7,944.81	2,027.40
AMP Property Security	11,584.85	9,913.73	1,671.12
Term 5012 8771 (Exp. 26/9/2005)	60,000.00	60,000.00	0.00
Term 5022 4068 (Exp. 9/12/2007)	20,213.75	20,213.75	0.00
Term 5028 3226 (Exp. 2/10/2005)	40,000.00	40,000.00	0.00
Term 6030 6026 (Exp. 9/8/2005)	10,000.00	10,000.00	0.00
Bond 9502 2742 MATURED 15/7/05	14,000.00	14,000.00	0.00
Bond 948975 (MATURED 31/3/05)	0.00	18,000.00	-18,000.00
Bond 9400 7968 (CLOSED Feb 05)	0.00	10,000.00	-10,000.00
Total 2. CAPITAL ACCOUNT (Fonduso)	202,457.06	213,303.04	-10,845.98
3. BOOK SERVICE (Libroservo)			
Challenge Bank (WA) 204-593	0.00	646.09	-646.09
NAB Cheque Account NSW 932-2985	14,038.44	28,812.81	-14,574.37
UEA Account aalw (Netherlands)	4,735.00	4,550.27	184.73
Total 3. BOOK SERVICE (Libroservo)	18,773.44	33,809.17	-15,035.73
4. CORRESPONDENCE COURSE			
Cheque Account 4710 918 439	2,032.44	2,102.79	-70.35
CBA Term 5003 6074 (Exp. 2/8/02)	8,000.00	7,500.00	500.00
Total 4. CORRESPONDENCE COURSE	10,032.44	9,602.79	429.65
5. SUMMERSCHOOLS			
SUMMER SCHOOL 2006	500.00	0.00	500.00
SUMMER SCHOOL-ADELAIDE (Closed)	0.00	4,862.71	-4,862.71
Total 5. SUMMERSCHOOLS	500.00	4,862.71	-4,362.71
6. INTERNATIONAL TRAVEL FUND			
Term 5014 3134 (Exp. 2/10/2005)	17,802.90	16,903.81	899.09
Term 5013 8423 (Exp. 26/8/05)	17,130.02	16,146.83	983.19
Total 6. INTERNATIONAL TRAVEL FUND	34,932.92	33,050.64	1,882.28
Total Current/Savings	281,000.55	306,614.20	-25,613.65
Other Current Assets			
INVENTORY			
Stock - 3. Book Service	26,037.00	28,037.00	-2,000.00
Stock - 4. Correspondence Course	2,092.31	2,246.19	-153.88
Canberra Library (Approx. \$)	8,500.00	10,000.00	-1,500.00
Total INVENTORY	36,629.31	40,283.19	-3,653.88
Total Other Current Assets	36,629.31	40,283.19	-3,653.88
Total Current Assets	317,629.86	346,897.39	-29,267.53
Fixed Assets			
PROPERTY & EQUIPMENT			
Total Fixed Assets	4,247.49	6,219.68	-1,972.19
TOTAL ASSETS	321,877.35	353,117.07	-31,239.72
LIABILITIES			
Current Liabilities			
Other Current Liabilities			
Oceania Commission Fund	235.00	125.00	110.00
Ilel Deposit	89.71	89.71	0.00
Tax Payable	185.00	0.00	185.00
Total Other Current Liabilities	499.71	194.71	296.00
Total Current Liabilities	499.71	194.71	296.00
TOTAL LIABILITIES	499.71	194.71	296.00
NET ASSETS	321,386.64	352,922.36	-31,535.72
EQUITY			
Opening Bal Equity	255,522.90	255,522.90	0.00
Retained Earnings	95,160.82	18,700.18	76,460.64
Net Income	-30,296.88	77,699.30	-107,996.18
TOTAL EQUITY	321,386.64	352,922.36	-31,535.72



Chartered Accountant
Business Advisors
Tax, GST & MYOB Specialists
Productivity Solutions

12 Wesley Court, Burwood East 3151
Ph: (03) 9945 7000 Fax: (03) 9945 7045
www.addisons.com.au
Email: info@addisons.com.au

15 December 2005

To The Members
Australian Esperanto Association Inc
C/- Mr S Pitney
Level 1 21 Burwood Road
Hawthorn VIC 3122

DEAR MEMBERS

AUDITORS CERTIFICATE

SCOPE

I have audited the financial statements of the Australian Esperanto Association Inc for the year ended 30 June 2005 as set out on the pages attached.

The association and its treasurer are responsible for the financial statements. We have conducted an independent audit of those financial statements in order to express an opinion on them to the members of the association.

Our procedures included examination on a test basis of evidence supporting the amounts and other disclosures in the financial statements. These procedures have been undertaken to form an opinion whether in all material respects the financial statements have been presented fairly in order to provide members with an accurate reflection of the years trading and financial position.

The audit opinion has been formed on the above basis.

AUDITORS OPINION

My opinion is that the financial statements of the Australian Esperanto Association Inc are properly drawn up so as to give a true & fair view of the association's state of affairs as of 30 June 2005 and its receipts, expenditure and cash flows for the financial year ended on that date.

A handwritten signature in blue ink, appearing to read "Steven Wildes".

Steven Wildes
Addisons Chartered Accountant
15 December 2005

☺ • **odlo bokserp**

JARRAPORTO POR LA JARO 0239

Mi devas skribi mian raporton ĉijare percizile, pro manko de papero, kiel ankaŭ de tajpilo (inventota post jam pli ol 1600 jaroj); sed precipe pro tio ke miaj ĉinaj amikoj rifuzis prunti al mi sian komputilon, kiun ili antaŭnelonge inventis, ĉar la transporto-kompanio mezopotamia postulis ekstran sekretan pagegon pro la eventuala eltriviĝo de siaj ŝargkameloj, kaj la kosto viŝi la ŝviton de la fruntoj de la kamelŝoforoj.

Mi verkas ĉi tiun raporton ĝuante la lukson de baniĝo en la Banejoj de Karakalo en Romo, kune kun ĉ. 1200 aliaj personoj (dumvitre la sinbanantaro ĉiam estas malgrandkvanta).

Nu, preskaŭ nenio okazis dum la pasinta jaro. Reĝino Himiko de Japanio sendis ambasadoron al Ĉinio, la unua oficiala kontakto inter tiuj du poencaj regnoj. Kaj laŭ raportoj, iu teroristo (aŭ eble porlibereco-batalanto?) nomita Trieu Au kaŝe planas ribelon kontraŭ la ĉinaj okupaciantoj.

Piratitaj ekzempleroj de nova furora libro titolia *Lotusa Sutro* ekscitas la religiulojn, kiuj nomas la verkintojn pseŭdoateistoj, kion plene rebatas amikoj de la verkintoj.

La konstruistoj de la nova Hipodromo en Konstantinopolo raportas ke pro ekaltiĝo de la prezo de betono, la stadiono «eble estos preta nur post plena jarcento»! Tamen, laŭ la planoj, ĝi estos la plej granda hipodromo en la mondo.

La Antarktika Esperanto-Asocio informas ke nun membras en ĝi 314 pingvenoj, rekordo por la esperantista movado. Nova klaso de Esperanto, kun 11 studantoj, komenciĝis en la ĉefurbo de Gaŭlio. Samtempe, oni serĉas proponojn por la nova nomo de tiu insulvilaĝo. Plej popularaj proponoj ĝis nun estas Galurbo, Prefekto, Eksromo; plej malpopulara estas la proponita nomo Parizo, pro ĝia memorigo pri la fama boksisisto, kiu murdis la multe amatan militheroon Añilo.

Odlo

Kiel Kontribui al Esperanto sub La Suda Kruco

Ni akceptas eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan materialon. Ni preferas ricevi kontribuojn per e-poŝto. Surpaperaj tekstoj devas esti klare tajpitaj per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flanko de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas.

Limdato por la majo-junia numero: 15a de junio 2006

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita.

Esperanto Sub La Suda Kruco

P. O. Box 643 • York WA 6302 • Aŭstralio

esk@esperanto.org.au



La Aŭstrialia Esperanto-Asocio

P. O. Box 419 • Manly NSW 2095 • Aŭstralio

<http://www.esperanto.org.au/>

Prezidanto: Igor Couto | prezidanto@esperanto.org.au

Sekretario: Miranda Lutz | sekretario@esperanto.org.au

Kasisto: Stephen Pitney | kasisto@esperanto.org.au

Membreco: \$40 por individuo aŭ klubo [+ \$5 por familiano(j) ĉe la sama adreso].

Por studento aŭ pensiulo: \$25. Asocia membreco: \$10.

Pagu al Libroservo de AEA ĉe 143 Lawson St, Redfern NSW 2016.



La Nov-Zelanda Esperanto-Asocio

P. O. Box 8140 • Symonds St • Auckland 1035 • Nov-Zelando

<http://www.esperanto.org.nz/>

Prezidanto: Bradley McDonald | bradley.m@xtra.co.nz

Kasisto: Jackie Fox

Sekretario: Howard Gravatt | hgravatt@ihug.co.nz

Membreco: \$40 por individuo, \$50 por geedza paro; \$10 por studento aŭ junulo (<20-jara). Klubo: \$1 por ĉiu ano.

Sendu vian kotizon al la Kasisto ĉe la asocia adreso.

Abonoj ekster Aŭstralio kaj Nov-Zelando kostas €24,00. Pagu ĉe UEA al la konto ael-w de la Libro-servo de Aŭstalia Esperanto-Asocio

Wholly printed in Australia.

Typeset by Donald Broadribb, PO Box 643, York WA 6302.

Printed by Monash University, Wellington Road, Clayton Vic.

esperanto sub **LA SUDA KRUCO**

if undeliverable return reply paid to:
D. Broadribb • P. O. Box 643 • York WA 6302 • Australia

Print Post Approved:
PP631048/00005

**SURFACE
MAIL**

POSTAGE
PAID
AUSTRALIA